

Sud-Rejna Kuriero

Aprilo
2012

Komuna inform-bulteno de Esperanto-Societo Basel kaj Mulhouse-Esperanto

N°46

Espace 110
FR-68110 ILLZACH
CCP 19684 F Strasbourg
mulhouse.esperanto11@free.fr



Esperanto Societo Basel
Postfach 178
CH-4005 Basel
esperantobasel@gmx.ch

Karaj membroj, karaj gesamideanoj, karaj legantoj,

Jam komence de 2012 abundas diversaj Esperanto-eventoj. Plej unue okazis nia tradicia 3-reĝa festo.

En februaro ni retroviĝis por nia Ĝenerala Asembleo, pri kiu raportas Frédéric Porretti.

En marto okazis festo de lingvoj en la Universitato de Mulhouse. Nia grupo disponis je ampleksa spaco por informi.

Niaj lundaj kunvenoj regule povis okazi kaj eĉ allogis membrojn el la Bazelo Grupo.



En la muzeo Lalique

Fine de marto sukcese disvolviĝis la regiona staĝo en La Petite Pierre. Bertrand Wick estis la ĉefa organizanto, ni danku al li pro la bona sukceso.

Novaj proponoj venis de Yves Stutz pri Vitarue.

André Grossmann

Rigardante ĉarmajn fotojn pri pasinta vintro, ni deziras al vi tre agrablan printempon.

Programo EBS 2012 de aprilo ĝis aŭgusto

Lunde	23.04.2012	19a	Saint-Louis Babilado „La Fadeno“ ek de la 19a en la restoracio „La poste“ en Saint-Louis
	24.05.2012		Grün 80 ek de la 19a en la mem- serva-restoracio Migros
Lunde	25.06.2012	19a	Saint-Louis Babilado „la Fadeno“, en la restoracio „La Poste“
Sabate	14.07.2012	21a	Nacia festo en Francio
Dimanĉe	26.08.2012		Ekskurso al Akvofaloj

Nicole Béroud

Für Pazifismus und Esperanto

Neun Jahrzehnte nach seinem Ableben und 100 Jahre, nachdem er den Friedensnobelpreis erhalten hat, findet Alfred Hermann Fried (1864-1921) die verdiente Anerkennung.

Im Mai 2011 wurde in seiner Heimatstadt Wien eine Gedenktafel an dem Haus in der Widerhofgasse 5 angebracht, in dem er von 1908 bis 1914 gewohnt hat. Die Tafel ziert das von ihm selbst entworfene Logo „Organisiert die Welt“, und das Motto „Europa ist nicht mehr die Angelegenheit eines einzelnen Staates...“ weist darauf hin, wie weit sein Streben seiner Zeit voraus war. Zu Beginn des 21. Jahrhunderts konnte eine aktuelle Biografie zu Recht mit dem Titel „Verdrängt und vergessen“ erscheinen. In der Friedenbewegung, die ihm Ungeheures zu verdanken hat, war die Erinnerung an ihn ebenso erloschen, wie in der Esperanto-Bewegung, die ihn eigentlich als Pionier einer großen Idee feiern müsste.

In den geschichtlichen Darstellungen zur Esperanto-Bewegung an der Wende zum 20. Jahrhundert taucht der Name Alfred Hermann Fried durchaus als Autor eines der ersten Esperanto-Lehrbücher in Deutschland auf. Er wird als „Pazifist“ bezeichnet, und es wird auf den Nobelpreis hingewiesen. Dass er Jude und Freimaurer war, wird nicht besonders hervor-

gehoben, und so ist es für uns heute nicht mehr auf Anhieb verständlich, wie diese Verbundenheit das Denken und Wirken nicht nur von Fried, sondern auch von denen, mit denen er zusammengearbeitet hat oder befreundet war, bestimmt haben.

Schwerer Start

Als Sohn jüdischer Einwanderer aus dem südlichen Ungarn hatte der kleine Alfred in Wien keine leichte Kindheit. Er musste nicht nur seine Geschwister betreuen, sondern auch zum Unterhalt der Familie beitragen - und dabei kam die Schule zu kurz. Nach dem Abschluss einer Lehre als Buchhändler in Wien zog es ihn dahin, wo man unabhängig vom Stand, Herkunft und Religion sein Glück machen konnte : Nach Berlin.

Gut ein Drittel seines Lebens, von 1884 bis 1903, hat Fried in Berlin verbracht. Ganze 19 Jahre hat er in der deutschen Hauptstadt gelebt und gearbeitet : für seinen Lebensunterhalt, für den Frieden und auch für Esperanto.

Fried beginnt als Buchhändler zu arbeiten und landet schließlich in der Verlagsbuchhandlung Freund & Jeckel in der Potsdamer Straße 27, wo heute der Neubau der Staatsbibliothek Preußischer Kulturbesitz (StaBi) steht. Er versucht, alles zu lesen, was ihm in der Buchhandlung in die Finger kommt, und besucht in seiner Freizeit an der Humboldt-Universität Vorlesungen zu Literatur und Rechtswesen als Gasthörer.

Er wird Stammgast im Café Kaiserhof am Wilhelmsplatz 3/5 gegenüber der Reichskanzlei. Hier kann man, wie in unzähligen Cafés im Berlin-Mitte der damaligen Zeit, die lokale, überregionale und internationale Presse lesen und Informationen austauschen. Heute steht an dieser Stelle die Botschaft Nordkorea. Fried möchte selbst in das Verlagswesen einsteigen, kann aber erst im November 1887, nachdem er von Januar bis Juli nach Österreich zum Wehrdienst eingezogen worden war, die Buchhandlung Freund & Jeckel übernehmen, die als „A. Fried Verlag Berlin“ ins Handelsregister eingetragen wird. Er hatte genau beobachtet, welche Publikationen auf dem deutschen Markt Erfolg haben könnten und richtet sein Verlagsprogramm danach aus. Er erwirbt die Rechte für eine Volksausgabe „Fürst Bismarcks gesammelte Werke, Briefe, Reden und Aktenstücke“ von Bruno Walden, wofür ihm der Reichskanzler persönlich dankt. Es erscheinen aber auch eine „Geschichte der jüdischen Literatur“ in 18 Lieferungen und ausgewählte Werke von Heinrich Heine. (Fortsetzung folgt) (Esperanto aktuell 2011/3)

Agad-raporto de Mulhouse- Espéranto por 2011

En januaro okazis la tri reĝa festo en Espace 110.

La laŭleĝa **Ĝenerala Membro-Kunveno** okazis sam-loke la 3an de Februaro.

La **festo de lingvoj** okazis en la universitato de Mulhouse, tie estis informbudo por infomi pri Esperanto kaj pri la kursoj en la universitato.

La 69a regiona staĝo okazis en Le Vic komence de aprilo, kunlaboris membroj de nia asocio.

La 5an de aprilo okazis festeto en Espace 110 kun akcepto de japanaj gastinoj, kiuj prezentis **japanan paperan teatraĵon**.

En Espace 110 okaze de premio-disdonado la 30an de majo, Andreo ricevis oran medalon pro lia plurjara instruado de Esperanto.

La unuan de junio Edmondo prelegis en Colmar.

La **jarfina fest-manĝo** okazis en Ungersheim, en restoracio apud la subĉiela muzeo **Ecomusée**.

La 25an de septembro deĵoris Roberto ĉe **libro-festo en Wesserling**.

La 28an de Septembro, Jacques prelegis en Village Neuf por propagandi la lingvon.

En Espace 110 komenciĝis la **Esperanto-kurso por progresantoj** kun 5 gelnantoj. En Village-Neuf ekfunkciis enkonduka kurso por komencantoj kun 5 gelnantoj

La 2an de oktobro Anne deĵoris ĉe budo en Ecobio foiro en Hegenhein

La 19an kaj 20an de novembro okazis budoj en **Bédéciné** kaj samtage foiro pri **ekologio kaj justa komercado**.

La 10an de decembro okazis la **Zamenhof-festo** en Weil-am Rhein organizita de niaj amikoj de Bazelo.

Dum la jaro regule funkciis la lundaj babil-kunvenoj, nomataj **verdaj fadejoj**. SRK aperis 4 foje jare.

Nia retejo **<http://mulhouse.esperanto.free.fr>** daŭre informas pri la diversaj aktivecoj de nia grupo, kaj ankaŭ de la regiono. Nun estas konsultebla en ĝi nia biblioteko.

Nia dissendo-listo **mulhouse-esperanto@yahoo.com** rezervita al niaj membroj, refoje montris sian utilecon por rapide kaj akurate informi pri lokaj eventoj.

La Sekretario, Frédéric PORRETTI.

Nia Ĝenerala Membro-kunveno

Nia membro-kunveno okazis en la Espace 110 la 7an de februaro 2012. Ĉeestis : s-inoj Simone Kiry, Anne Vernet kaj s-roj Jacques Pineda, Andreo Grossmann, Frédéric Porretti, Robert Kueny, Bertrand Wick kaj Yves Stutz.

La last-jara raporto verkita de nia sekretario Frédéric Porretti aperis en la numero 42 de SRK, ĝin legis nia prezidanto, ĝi estis unuanime akceptita.

La sekretario prezentis la agad-raporton de 2011 kaj la prezidanto prezentis la finanĉan raporton de 2011. Ambaŭ estis unuanime akceptitaj.

Finiĝis la mandatoj de jenaj komitatanoj : André Grossmann, Alain Sarrasin kaj Bertrand Wick. Ili estis unuamme reelektitaj.

La nova komitato elektis la estraron por la jaro 2012. Ĝi estas jena:

Prezidanto: André Grossmann

Sekretario por la franca: Robert Kueny

Sekretario por Esperanto : Frédéric Porretti

Kasista funkcio: André Grossmann

Eksteraj rilatoj: Simone Kiry

Nia biblioteko ekfunkciis en 2010 kun ricevitaĵ libroj. En 2011 la libroj estas enretigitaj en nia retejo. Andreo proponis aldoni al la listo ankaŭ personajn librojn por prunto al nia membroj.

Jacques menciis enkondukan kurson por komencantoj. Li planas 7 vesperojn por konigi la lingvon sed nur en la kadro de mond-civitanoj. Tial ne eblas ĝin proponi al eksteraj komencantoj.

Andreo parolis pri la verdaj fadenoj, kiuj nun regule okazas en Mulhouse kaj en Saint-Louis la lastan lundon de monatoj. Ekestis la demando, ĉu plani ankaŭ aliajn paroligajn kunvenojn.

Yves informis pri evento de fino de majo ĝis fino de Julio, kiu nomiĝas vitarue kaj okazos en Mulhouse. Anne proponis ke SRK estos proponita en PDF versio.

La sekretario , Frédéric Porretti

La pagintaj membroj de Mulhouse-Esperanto trovos en ĉi-tiu numero la finanĉan raporton por la jaro 2011.

Mulhouse: « urbo de arto kaj historio »

Ekde 2008 Mulhouse estas la nura alzaca urbo honorigita kiel "urbo de arto kaj historio". Ĝi sendube ŝuldas tiun prestiĝan titolon, favordonita de la ministrejo de kulturo, al eksterordinara politika historio kaj prospera industria pasinteco (ĝis nun, nur 78 el 35000 francaj komunumoj ricevis ĝin). Tuj du heredoj, hodiaŭ bone valorigitaj rimarkeble riĉigas ĝian vizitkarton. Mallonga okul-aludo al tiu impona estinteco:

La respubliko: la tiel nomata "Bollwerk-civito" laŭ legendo naskita de amoj inter brava soldato trovita vundita kaj de bela muelistino, ekpartigis la tutan alzacan historion ĝis duono de la 15a jarcento. Kelkaj el tiuj eventoj estis feliĉaj kiel la protekto kaj favoro fare de la germanaj princoj, inter ili la plej fama: Frederiko Ruĝbarbulo. (jam en 1306 la urbo ricevis la titolon de "libera imperia urbo"). Sed aliaj estis pli dramaj kiel la barbaraj rab-ekspedicioj aŭ la enmarŝadoj de fremdaj armeoj. Tial en 1222 la urbo ĉirkaŭiĝis per muro kaj limfosaĵoj. ("Bollwerk" estas unu el la tre raraj postsignoj de la remparo) Forte staris tiu muro dum ses jarcentoj, nur unu foje perforte transpasita en 1587 de la svisoj, tamen tiam aliancanoj (ili timis ke la urbo aliĝu al la Kontraŭa-Reformacio) Post aliĝo en 1314 al la Dekapolo, kiu grupigis la plej gravajn urbojn de

la rejna valo, Mulhouse ĉiam pli ema al libereco faris sian propran revolucion. En 1466 ĝi forpelis la nobelojn kaj la strasburgajn episkopojn kaj sin proklamis "Respubliko libera kaj sendependa" regata de 12 burĝoj. Tiel Mulhouse monbatis, havis sian propran justicon, siajn proprajn pezojn kaj mezurojn, deklaris militon aŭ subskribis pacon siavole.

La nova Respubliko tre rapide aliĝis al protestantismo kaj post 1515 forte alianciĝis al la helveta konfederacio tiel ĝi evitis la teruran "tridekjaran militon", kiu elrabis Alzacon (ĉar Svisio estis restinta neŭtrala). Ĉe la kontrakto de Westpalie en 1648 Francio en la venka tendaro, akiris Alzacon krom Mulhouse. Tiu urbo kiu ne superis 12 kvadrat-km-ojn tuj rezistis ankoraŭ ĝis 1798 al ĉiuj avidecoj de siaj franca kaj germana najbaroj. Necesis kruela dogana blokado por ke finfine la "wackes" konsentas "sin doni" al Francio (Wackes, kromnomo de la loĝantoj, signifas: stratbubaĉoj).





La franca Manchester

La miluza Respubliko, protestanta, laborema kaj tre mor-rigora rapide tuj disvolvis potencon kaj radiantan industrion. Post 1746 Samuel Koechlin, J. Jacques Schmalzer kaj J. Henri Dolfus kreis la unuajn indienajn manufakturojn. Tiuj belegaj presitaj teksaĵoj estis ĝis tiam importitaj el Hindio per la fama "Kompanio de Hindioj". La metiejoj ankoraŭ manaj multobliĝis dank'al lokaj avantaĝoj: bonegeco de la akvo de la rivero Doller por la fabrikado de la kolorigiloj, ĉeesto jam en la urbo de gravega kanalreto sed ankaŭ dank'al la malpermeso trudita en Francio fabrikadi tiun produkton por ne konkurenci la Kompanion de Hindioj. Poste en Eŭropo disvolviĝis la teksta industrio, kiu evoluis dank'al la grandaj mekanikaj progresoj, kiun partoprenis miluzaj inĝenieroj kiel Josue Heilmann elpensanto de la mekanika kombilo. Alia mondfama teksta uzino: D. M. C (Dolfus-Mieg-kompanio) kreita en 1800, kiu eksportis luksajn fadenojn kaj brodaĵojn. Fine la nova peza mekanika industriigo tuj ekstartis en la

urbo: tiel la SACM (alzaca societo de mekanikaj konstruaĵoj) kreita en 1826 tuj dungis ĝis 6500 personojn. Ĝi eksportis: teksmaŝinojn, pezajn mekanikajn pecojn, dizelajn motorojn kaj lokomotivojn. La uzinoj "Dumoulin" siaflanke konstruis la unuajn famajn londonajn aŭtobusojn. Post 1908 Mulhouse iĝis pionera en la ekapero de la flugmaŝinoj kaj la reputacio de "Aviatic" trairis Atlantikon. Iu usonano Edward Boing efektivigis stud-staĝojn ĉe ĝi antaŭ ol krei siajn propajn aviadilojn. Tiel, ĝis la duono de la 20a jarcento, vasta reto de metiejoj kaj uzinoj kuntrenis al la urbo milojn da laboristoj kaj oficistoj el la regiono sed ankaŭ el Svislando kaj Germanio. Invito: promenu do tra Mulhouse kaj levu de tempo al tempo la kapon, vi tiam vidos kaj aŭdos ŝtonojn rakonti al vi la mirigan historion de tiu malgranda Respubliko iĝinta la "cent-fum-tura urbo" tamen ne tro pensu pri la laborista stato.... ĉar tio estas alia historio, iomete malmulte bela.

Jacques Pineda

La festo de la lingvoj en la Universitato de Alta – Alzaco (Mulhouse) 2012

La 17an de marto okazis en la Universitato de Alta Alzaco, en la Fakultato pri Beletro, Lingvoj kaj Sociaj Sciencoj de Mulhouse Festo de lingvoj. La dekanano Yann KERDILES refoje invitis nian asocion prezenti nian lingvon. La elstarigita lingvo estis ĉi-jare la itala. Deĵoris ĉe la budo Edmond LUDWIG, André Grossmann, Roberto KUENY, Jacques PINEDA, Yves STUTZ.

En la mateno okazis deklamado de pluraj poemoj en la itala. Edmond proponis kanzonon el la KD de la kantisto Emmanuele ROVERE, ĝi estis legata en Esperanto kaj en la itala. Poste aŭdiĝis la kanto kaj eĉ kunkantis Edmond.

Dume en la supra etaĝo ni povis informi la publikon pri la lingvo kaj subskribi la peticion.



71a Regiona Staĝo de

esperanto
France-Est

organizita de

MULHOUSE  **ESPERANTO**

**23 / 24 / 25-ajn de marto
2012**

**En la Feriejo Ambroise
Croizat**

**37, route d'Ingwiller
67290 LA PETITE PIERRE**

La ĉi-jara regiona staĝo de Esperanto France-Est estis organizita de nia loka grupo Mulhouse-Esperanto, dank'al la iniciatoj de Bertrand Wick. Jam en 2011 li proponis ĝin okazigi en La Petite Pierre en nord-okcidenta Alzaco, lia origin-regiono. Tie li trovis tre taŭgan ferio-centron Ambroise-Croizat, kiun li proponis al la komitato de EFE. Certe tio estis nova agadtereno por li, kiel unua-foja organizanto. Li spertis diversajn problemojn kaj ĉefe la zorgojn pro malakurataj aliĝoj de pluraj partoprenantoj. Sed finfine estis pli ol 50 partoprenantoj, la vetero estis jam tute printempa kaj la tuta programo agrable disvolviĝis por la plezuro de la staĝanoj. Ni ĝuis eminentan preleganton Tomasz Chmielik el Pollando kaj romantikan kantiston Manuel Rovere el Italio. Krome Bertrand sukcesis lerte kombini nian staĝon kun la loka asocio de poetoj. Lerta maniero por konigi Esperanton al la loka publiko.



En la domo estis tre agrabla restoracio kun bongustaj manĝoj. Sed ja necesis esti paciencaj, ĉar la servo ne estis tiom akurata. Malgraŭ tio, ĝojas la manĝontoj.

Vendrede vespere Bertrand montris al la partoprenantoj multajn filmetojn, kantojn, voĉ-legaĵojn troveblajn en la reto.





Sabate matene okazis la turisma programo al La Petite Pierre. La agrabla vetero instigis preskaŭ ĉiujn atingi la vilaĝon piede. Unue ni vizitis la Paganan Domon, kie estis ekspoziciataj kuko-formoj kun ege belaj reliefoj. La multekostaj muldiloj, ĉefe el Svislando, troviĝas en la kastelo. En la sigela muzeo eblis admiri la grandan kolekton de sigelo-reproduktaĵoj. Sigeloj estis origine faritaj el abela ciro. En la muzeo ili estas el la gipso kun verniso.



Poste vizito al preĝejo, la tuta grupo atingis la kastelon de La Petite Pierre. Fakte ĝi estis vizitebla nur de ekstere.



Tie eblis ĝui vastan panoramon kaj admiri iujn artaĵojn en la parko, antaŭ ol reveni al la feriejo.





Sabate posttagmeze okazis la kursoj kaj la prelegoj de Tomasz Chmielik. Li emfazis multajn historiajn eventojn rilate al la judoj en Eŭropo kaj ties kulturo.

En alia prelego li rakontis pri Esperanto en la komenco de lasta jarcento pri Edmond Privat kaj Hector Hodler.

En la vespera programo Bertrand sukcesis kuniĝi poezion kaj Esperanton. Ni ĝuis la poeziojn, kiujn gvidis s-ino GUTFRIED.

Edmond legis poemon de Paul-Georges Koch en la germana kaj la Esperanto-version. Plurajn poemojn Edmond tradukis al Esperanto kaj jam eldonis libreton.

Roberto lerte deklamis la fablon "La cikado kaj la formiko" kaj la originalan poemon « Katenoj » de la brito Aleksander William THOMSON.



En la dua parto Manuel Rovere kantis tre romantikajn kantojn el sia repertuaro kun ofte tre konataj melodioj. Ili estis tradukitaj aŭ adaptitaj el la itala kaj la angla.

Dimanĉe matene refoje ni ĝuis la lertecon de nia preleganto, kiu fervore kaptis la atenton de la publiko.

Edmond transdonis donace al la kantisto kaj al la preleganto botelon da alzaca vino.

Jam estis invito al la 72a staĝo en Ortenberg proksime de Offenburg por la 21-23aj de septembro 2012.

Raporto kaj fotoj de Andreo

La retejo de nia asocio Mulhouse-Espéranto jam metas je dispono de siaj membroj kaj de la publiko sian retejon

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Eblas tie trovi informojn pri niaj aktivecoj kaj fotojn pri pasintaj eventoj. Krome troviĝas en ĝi ligojn al pluraj retejoj, ĉefe en la rubriko "Esperanto en la mondo"

Nova retejo estas nun menciata jam en la unua paĝo. Ĝin kreis nia amiko Bertrand Wick el Village-Neuf:

esperanto

esperanto.3frontieres@laposte.net

3frontières



Dossier de presse

Accueil

Présentation

VillageneufEo

Videos

vidéos musicales

Musique

Points de vue

Accueil

Présentation

"Kiu lingvo por la

00:00 / 00:00

La marista amo -

00:00

VillageneufEo

Videos

Samideano - ETERNÉ

00:00 / 00:00

Sinkopo - uro

00:00

vidéos musicales

Musique

Points de vue

Esperanto en la reto

<http://www.wix.com/esperanto3f/villageneufeo>

proponas vastan menuon por informiĝi pri Esperanto, por trovi muzikojn, librojn, radio-staciojn, kiuj elsendas en Esperanto, librojn, kursojn.

Ĉi-sube aperas la tuta menuo kaj ĉe "Vidéos musicales" eblas elekti muzikaĵojn kaj per alklako ilin aŭskulti.

00 33 9 75 69 32 93

esperanto
Village-Neuf

ue Radio Cours Histoire Célébrités Livres Liens Contact Infos

Apud Maro

Esperanto Desperado -

GOOGLE propose la traduction en Espéranto

l'espéranto au bac

Verdaj Fadenoj en Mulhouse kaj Saint-louis

Niaj lundaj renkontiĝoj, nomataj **verdaj fadenoj** estas daŭre vizitataj de niaj membroj kaj kelkfoje ankaŭ de membroj de la bazela grupo. Ili komenciĝas proksimume je la 19a kaj ebligas tute libere babili en Esperanto, pri plej diversaj temoj.

La 26an de marto ĝi okazis en Mulhouse en la kafejo "**le Printemps**". Simpla manĝo estas tie havebla.



En Mulhouse: la kunvenoj okazos en **la kafejo: 7 rue du printemps**

En Saint-Louis: la kunvenoj okazos en **Restaurant de la Poste, 10 rue de Huningue.**

Jen la venontaj datoj

23a de aprilo Saint Louis

31a de majo Mulhouse

25a de junio Saint Louis





Vitarue

Kion signifas "Vitarue", laŭ signife: ĝu-vivu vian straton.

Homoj, asocioj prezentas siajn aktivecojn al la publiko. Tabloj kaj seĝoj estas metitaj senpage je dispono de la partoprenantoj.

Yves proponas, ke nia grupo Mul-house-Espéranto ankaŭ partoprenu ĝuste por montri Esperanton al la juna publiko. Poste pere de nia dissendo-listo ni invitos niajn membrojn akcepti de tempo al tempo deĵoradon en iuj dimanĉ-matenoj de la 10a ĝis la 12.



Du dimanche **20 mai** au **22 juillet** 2012, un rendez-vous est donné tous les dimanches matins de 10h à 12h sur les berges de l'Ill. Vita'Rue s'adresse aux personnes souhaitant commencer leur journée dans la **convivialité** et le **bien être**. A travers l'initiation et la découverte d'activités physiques et d'expression artistique, c'est l'occasion de tisser des liens avec ses voisins et ses amis.

C'est l'opportunité de passer un moment privilégié et de faire de nouvelles rencontres dans un cadre **agréable** et **verdoyant** en oubliant tout rapport à l'argent puisqu'oublier son porte-monnaie est recommandé !.

Pour la saison 2012, la nouveauté c'est une activité autour des langues. Vu l'ambiance et l'atmosphère de la manifestation, l'espéranto y a toute sa place.

D'ici le mois de mai une liste sera diffusée afin que les volontaires puissent s'inscrire pour l'animation sur un ou plusieurs dimanches de notre stand. Toutes les précisions utiles vous seront communiquées.

Situation géographique



Antaŭ la naĝejo Illberg

Semaine 2012 de l'espéranto

du 16 au 21 avril à Strasbourg

* **Du 16 au 21 avril 2012** : 4ème Semaine de l'espéranto à Strasbourg !
Des conférences, concerts, films, animations et découvertes en rapport avec la langue internationale équitable.

- ◆ **Lundi 16 avril à 19h30** : atelier de cuisine bilingue français-espéranto « comment rester en forme jusqu'à 80 ans et plus » par Lydia Bloch (sur inscription à info@esperanto-strasbourg.net) à la Ligue de l'enseignement, 15 rue de l'Industrie, Illkirch-Graffenstaden*
- ◆ **Mardi 17 avril à 20h** : film documentaire en espéranto « Sur les pas des Polonais en Argentine » à la Ligue de l'enseignement, 15 rue de l'Industrie, Illkirch-Graffenstaden*
- ◆ **Mercredi 18 avril à 20h** : découverte express de l'espéranto à la Maison des Associations, 1A place des Orphelins, Strasbourg*
- ◆ **Jeudi 19 avril à 21h** : concert « chansons issues de l'agriculture biologique... et de l'espéranto » par Gijom Armide au Rock City Café, 24 rue des Poules, Strasbourg*
- ◆ **Vendredi 20 avril à 18h30** : conférence « l'invasion planétaire des résidus plastiques » par Manfred Westermayer, chimiste allemand, à l'ITI-RI, bâtiment le Pangloss - Campus de l'Esplanade*
- ◆ **Samedi 21 avril à 13h30** : café littéraire, découverte de la littérature en espéranto avec Edmond Ludwig, auteur de plusieurs ouvrages, à la librairie « Soif de Lire » 11 rue Finkmatt, Strasbourg*

(*entrée libre)



* **Lundi 14 mai à 19h30** : soirée jeux en espéranto, dans les locaux de la Ligue de l'Enseignement à illkirch.

* **Du 25 au 29 mai 2012** : congrès annuel d'Espéranto France à Nantes.

Apertium

Liber-programara motoro kaj ilaro por maŝina tradukado

testi | **kio estas apertium** | **elŝuti** | **dokumentaro** | **kontakto**

Aperis aŭtomata tradukilo el la franca al Esperanto, libere uzebla ĉe
<http://apertium.saluton.dk>

La tradukilo estas bazita sur Apertium — rimedaro por konstrui aŭtomatajn tradukilojn, per kiu jam funkcias tradukiloj el la kataluna, hispana kaj angla al Esperanto kaj de Esperanto al la angla. Ĉiujn eblas uzi ĉe la supra adreso. Entute per Apertium funkcias ĝis nun 42 tradukiloj.

Apertium estas programaro malfermfonta kaj libera, same uzanta liberajn datumarojn. Ekzemple por ĉi tiu nova tradukilo el la franca al Esperanto estas ĉefe uzita kiel baza dulingva vortaro la Reta Vortaro, pro tio, ke ĝi estas libere uzebla kaj havas franclingvajn ekvivalenton preskaŭ por ĉiu vorto. La tutan fontokodon kaj lingvan datumaron de Apertium kaj de ties tradukiloj eblas elŝuti el <http://sourceforge.net/projects/apertium/>

Espereble tiu lanĉo ne nur liveros novan interesan rimedon, sed ankaŭ spronos pliajn homojn ekinteresiĝi pri la kreado de pliaj aŭtomataj tradukiloj aŭ la polurado de la jam ekzistantajn. Unu el la atutoj de Apertium estas, ke ĝia strukturo permesas, ke nefakuloj pri komputila lingvistiko povas evoluigi tradukilojn, kiuj donas kontentigajn rezultojn. Krome, tio, ke Apertium estas malferma, universitate stirata projekto, permesas, ke studentoj evoluigantaj tradukilojn ricevu monhelpojn, ankaŭ se temas pri tradukiloj el kaj al Esperanto. Ekzemple jam du jarojn Apertium ricevis de Guglo po naŭ 5000-dolarajn stipendiojn por studentoj evoluigantaj novaĵojn dum la nord-hemisfera somero. Tiel kredeble denove okazos post nur kelkaj semajnoj. Ĉar esperantistoj bone situas interne de la Apertium-projekto kaj mem Esperanto estas bone konsiderata en ĝi, estas tute eble ricevi stipendion por krei en tri monatoj kernon de tradukilo inter Esperanto kaj (hindeŭropa) lingvo. Cetere, sinanoncintoj ja ricevos la helpon de la cetera Esperanto-grupeto en Apertium. Aliflanke, ne-studentoj estas ja ne malpli bonvenaj en la projekton.

Interesiĝantoj iel kontribui ne hezitu aliĝi al la retlisto http://groups.google.com/group/apertium_eo aŭ eventuale kontaktu
< hectoralos(ĉe)gmail.com >

Loga programo en la franca Esperanto-kastelo Greziljono

aprilo-13/21: **Printempa kursa semajno**: Mondvojaĝantoj kun Mireille kaj Miguel (Kubo), intensivaj kursoj kun kaj Zsófia (ILEI) kaj Christophe, KER-ekzamenoj 3-gradoj. Informoj en gresillon.org/printempo

Somera programo kun 4 laŭtemaj semajnoj. Resumo interrete: gresillon.org/somero

julio-21/28: **Art-amatora semajno** kun teatro, muziko, dancoj, kantoj, korpomovoj kaj intensaj kursoj. Informoj interrete: gresillon.org/s1

julio-28/aŭgusto-04: **Alternativa semajno** kun verd-politika seminario kaj E-kursoj; por vegetaranoj, verduloj, ekologio-ekonomiko-alternativuloj, naturistoj kaj tendumantoj. Informoj interrete: gresillon.org/s2

aŭgusto-04/11: **Turisma kultura semajno**, kursoj de franca lingvo kaj Esperanto antaŭtagmeze, ekskursoj al reĝaj kasteloj ĉe rivero Luaro posttagmeze. Informoj interrete: gresillon.org/s3

aŭgusto-11/20: **Pupteatra festivalo** por infanoj, junuloj, familioj. Farado de manpupoj kaj vesperaj spektakloj kun Christoph Frank. Muziko, gitaro, sporto, ludoj kaj E-kursoj. Informoj interrete: gresillon.org/s4

Kontakto: kastelo@gresillon.org, +33-241 89 10 34, www.gresillon.org
Adreso: Gresillon, 49150 SAINT MARTIN D'ARCE, France
Jara agendo: gresillon.org/agendo



Etaj rakontoj pri la katedralo de Strasburgo



Jen tre ĉarma kaj interesa libro pri la Katedralo de Strasburgo. Ĝin verkis kaj kompilis Sûzel PAILHES kun la deziro, ke ĝi aperu en 9 lingvoj. La unua eldono estas en la franca, germana, kaj angla.


Nun aperis la dua eldono en la hispana, rusa kaj Esperanto

Sekvante du scivolemajn infanojn vi malkovros la etajn rakontojn de la Katedralo de Strasburgo. Bildoj, personaĵoj, legendaj lokoj ekvivis. Tiam eniru.. serĉu kaj...trovu.

48-paĝa libro kun tre solida kovrilpaĝo **12 €**

Afranko en Francio **4 €**

Afranko al Eŭropo **2,50 €**



Paul-Georges KOCH (1908 - 1982)

Eta selekto de poemoj tradukitaj el la germana

Pastoro kaj poeto. La lasta alzaca poeto, kiu verkis nur en la germana lingvo. Eta selekto de poemoj tradukitaj al Esperanto fare de Edmond LUDWIG. La libreto ankaŭ entenas mallongan biografion

20-paĝa libreto: afrankite: 2 € ĉe nia kasisto

KOTIZOJ KAJ ABONOJ POR 2012-2014

La kotizo al Mulhouse-Esperanto inkluzivas sendon de nia loka bulteno **Sud-Rejna Kuriero**. Ĝi ebligas partopreni la aktivajn de nia asocio kaj donas la rajton voĉdoni okaze de Membro-kunveno.

Sed ankaŭ eblas aboni nian bultenon SRK sen membriĝo al nia asocio.

Jen ĉi-sube la kotizoj kaj la abonoj por la 3 venontaj jaroj.

Jaro Kotizo Abono

Pagebla al André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, 68390 BALDERSHEIM
Ĉekojn je la nomo de: Mulhouse-Esperanto CCP 19684 F Strasbourg.

Seiki kaj Collin japana kaj franca pentristoj de la 19a jarcento



Apud Lago 1897

En parko Ueno en Tokio troviĝas la domo por la memoro de japana pentristo KURODA Seiki, kiu havis grandan rolon en la enkonduko de franca Impresionismo al Japanio. Meze de la domo oni povas admiri lian ĉefverkon " Apud lago " Tiu pentraĵo estas unu el la plej konataj artverkoj en Japanio. En la pentraĵo lia edzino Teruko

havas ventumilon enmane vestita en blua kimono, sidante sur la ŝtono sur la bordo de lago. Seiki bezonis unu monaton por finpentri tiun pentraĵon en Hakone en la gubernio Kanagawa. Li naskiĝis en la gubernio Kagoshima la 9an de aŭgusto en 1866.



Ekzemplo de biombo, japana rigardo-ŝirmilo ĉefe uzata kiel ornamaĵo



Portreta pentraĵo pri Kume Keiichiro. (1889)

Seiki unuafoje renkontis Kume Keiichiro en Parizo en oktobro en 1886. Li havis la saman aĝon kiel Seiki, kaj li daŭre havis kontaktojn kun Seiki dumvive. Ankaŭ li iam lernis pentradon sub la gvido de Collin, kaj ili tuj iĝis tre amikaj. Poste li komencis instrui arkeologion kaj anatomion en la Universitato de arto de Tokio post lia reveno al Japanio. Li aktivis ĉefe kiel edukisto.



Li estis adoptita de sia onklo (frato de patro Kiyotsuna) en 1871 kaj iris al Tokio por vivi kiel knabo en la domo de Kiyotsuna en 1872. La domo estis vasta, 2100 kvadratmetroj, kaj li povis vivi agrablan vivon tie. Li estas konata pro sia feliĉa vivo. Li atingis sian dekan jaron kaj eklernis unue la anglan kaj poste la francan. Li sukcesis esti akceptita de fremdlingva lernejo, kiam li havis 17 jarojn. Li lernis la francan por studi juron, ĉar tiutempe japana ŝtato imitis la francan juran sistemon, kiam ĝi ordigis civilan leĝon. La ŝtato sendis lian bofraton al la franca vic-ambasadorejo, tial kuniris Seiki, kiu forte deziris iri al Francio por lerni juron en 1884. Li loĝis en Francio dum 9 jaroj. Sed li ŝanĝis sian decidon. Li decidis ĉesi lerni juron kaj eklernis pentradon sub la gvido de franca akademia pentristo Raphaël Collin (1850-1916). Kial li ĉesis la lernadon de juro? Li renkontis alian pentriston Huji Masazo kaj pentraĵ-vendiston Hayashi Tadamasa en la japana vic-ambasadorejo, kaj tiuj artistoj, kiuj

Li atingis sian dekan jaron kaj eklernis unue la anglan kaj poste la francan. Li sukcesis esti akceptita de fremdlingva lernejo, kiam li havis 17 jarojn. Li lernis la francan por studi juron, ĉar tiutempe japana ŝtato imitis la francan juran sistemon, kiam ĝi ordigis civilan leĝon. La ŝtato sendis lian bofraton al la franca vic-ambasadorejo, tial kuniris Seiki, kiu forte deziris iri al Francio por lerni juron en 1884. Li loĝis en Francio dum 9 jaroj. Sed li ŝanĝis sian decidon. Li decidis ĉesi lerni juron kaj eklernis pentradon sub la gvido de franca akademia pentristo Raphaël Collin (1850-1916). Kial li ĉesis la lernadon de juro? Li renkontis alian pentriston Huji Masazo kaj pentraĵ-vendiston Hayashi Tadamasa en la japana vic-ambasadorejo, kaj tiuj artistoj, kiuj



Floréal (1886) pentrita de Raphaël Collin

Collin ekspoziciis tiun oleo-pentraĵon en Salono en 1886. La juna virino, kiu kuŝas sur herbejo, estas nuda. Pro tio, tiu pentraĵo altiris atenton. Sed en la teksto pri la Salono oni skribis, ke ĝi ricevis apartan laŭdon pro sia gracio en la universala ekspozicio en 1889. La Muzeo de Luxembourg aĉetis tiun pentraĵon kaj ĝi kortsuŝis Seiki, kiu lernis sub la gvido de Collin.

konstatis lian talenton, forte rekomendis al Seiki fariĝi pentristo. Li skribis sian decidon al la adoptinto Kiyotsuna, sed ĉi-tiu estis dumvive kontraŭ lia deziro. Ankaŭ Huji lernis pentradon en la ateliero de Collin, kaj tio influis lian selektadon de instruistoj. Collin ŝatis japanajn aferojn kaj kolektis japanajn "biombojn" (japanaj rigardoŝirmiloj ĉefe uzataj kiel ornamaĵoj), ceramikaĵojn, noajn maskojn ktp. Oni diras, ke Collin iam ridete diris, ke li estas amanto de japanajĵoj. Tiu japaneco altiris la japanajn pentristojn al li.

Seiki akiris kapablon por pentri pejzaĝojn, figurojn, nudojn ktp dank'al Collin. Li ankaŭ lernis kiamaniere pentri helajn pejzaĝojn kun la sunradioj kaj enkondukis delikat-tuŝan pentr-manieron en la japanan pentristan mondon.



M.M

Pejzaĝo de Parizo (1890).

Seiki pentris ĉefe naturan pejzaĝojn kaj suburban naturon, kiam li pentris pejzaĝojn.

Li malofte pentris urbon. En la malproksima fono oni vidas Ejfelturon. Tiu-tempe li iradis tien kaj reen inter Parizo kaj Grez.



Morta kampo (Grez) (1891)

Ebena kamparo ĉirkaŭas la vilaĝon Grez-sur-Loing. Laŭ la letero de Seiki la vintra pejzaĝo estas pli bela ol la somera. Eĉ post lia foriro, multaj japanaj pentristoj vizitis la vilaĝon, por serĉi modelon, aparte Asai Chu pentris ĉefan art-verkon tie.

Nia Kalendaro 2012

Aprilo 2012	3 - 10 - 17aj 23a	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Verda fadeno en St-Louis ekde la 19a
Majo 2012	15 - 22 - 29aj 20 - 27aj 31a	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Partopreno al Vitarue en Mulhouse de la 10a ĝis la 12a horo. Verda fadeno en Mulhouse ekde la 19a
Junio 2012	5 - 12 - 19 - 26aj 3 - 10 - 17 - 24aj 25a	Kursoj por progresantoj en Espace 110 de la 18a30 ĝis la 20a Partopreno al Vitarue en Mulhouse de la 10a ĝis la 12a horo. Verda fadeno en St-Louis ekde la 19a
Julio 2012	1 - 8 - 15 - 22aj	Partopreno al Vitarue en Mulhouse de la 10a ĝis la 12a horo.
Aŭgusto 2012	Feriado dum tuta monato	ILEI-konferencoj Universala Kongreso Internacia Junulara Kongreso

Aktualigitaj informoj aperos daŭre ĉe:

<http://mulhouse.esperanto.free.fr>

Niaj membroj ankaŭ estos informitaj per nia dissendo-listo:

mulhouse-esperanto@yahoo.com

Sud-Rejna Kuriero aperas kvaronjare. Ĝin redaktas por Esperanto-Societo Basel: Hanspeter SENN, Paradieshofstr. 164, CH-4054 Basel kaj por Mulhouse-Esperanto: André Grossmann, 5, rue des Pyrénées, FR-68390 Baldersheim. Ĝin eldonas Mulhouse-Esperanto.



Vintraj pejzaĝoj en Slovakio kaj en Siberio

